

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — **SABADELL**  
BARCELONO-HISPAŬUJO

**AVIZO:** La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

**ENHAVO:** Tarragona!... — Pri la vortaro de Grosjean Maupin. — Eho. — Studkomisio pri ĉiulanda verkaro. — Enlanda Movado. — Alilanda Movado. — Oficiala Parto. — Bibliografio. — Korespondado. — Literatura Konkurso (aldono).

## TARRAGONA!...

**H**AN passat nou mesos desde que a Sabadell s'acordà la celebració del Segon Congrès de K. E. F. a Tarragona. La vella ciutat, l'istorica, la que umilment, quietament, influix en la cultura encara avui, anc que no amb tanta poixança com en segles passats (el record dels quals ha quedat perpetuat en monuments i llibres), va enviar-nos, per son ilustrissim alcalde, la lletra de convit. En aquells jorns, quelcom que s'avia incorporat a nosaltres en dies no molt llunyans, de fresc record, va vibrar novament, i, unanims, els congressistes catalans varem acceptar i aplaudir el convit. Aquella lletra refermava la certesa que en nostra terra se 'ns considerava una força, un element de vida, de cultura; força i element que amb anterioritat ens avien reconegut les forces vives socials de Barcelona, de Catalunya, d'Espanya, del món sencer, i l'acte de consagració de les quals tingué lloc a Barcelona amb el V Congrès d'Esperanto.

«— Som una força!» deiem, convençuts, després del Primer Congrès, després d'aver escoltat les paraules de pregon reconeixement i distinció que les entitats locals ens adreçaven i després d'aver oit el convit de Tarragona. Conscients d'aquella força, però, prou ens do-

navem compte que contrèiem una responsabilitat davant dels nostres compatriotes i dels *samideanoj* : contreiem el deure de no deixar apaivagar ni afeblir l'entusiasme nostre per l'Esperanto; preniem amb nosaltres l'obligació de divulgar el nostre ideal continuament, sense parar. Contrèiem a l'ensembls el compromís de correspondre dignament, amplament, al convit que la ciutat del Camp ens enviava.

Dins la quietut de la sala de reunions, les comissions treballen com abelles, retirades en el llur rusc, elaboren per a demà, se fan plans i projectes, s'organitzen festeigs i recepcions, se fan esboços i croquis. L'obra s va pastant, i paulatinament van apareixent els detalls, les línies, els perfils, fins que a la fi l'obra serà finida. En el dia d'avui la tasca del Congrés de Tarragona apar les vigílies de la primavera, quan la terra sent en son sí l'inquietut de la florida que s'inicia. Demà, demà passat, serà l'esplendida florida que inondarà de joia ls nostres esperits.

Contribuim-hi tots, companys : tots sens mancar-n'hi un. Tarragona ns vol, i, franca, desinteressada, ens obre ls braços amb gest ample. Fem que, amb la nostra individual col·laboració, la ciutat se senti joiosa del nostre esforç; i que no desmentim amb la nostra acció el concepte que de nosaltres i de la nostra institució s té. Per això cal que ns proposem triomfar, car ara es l'ora. Més que totes les propagandes individuals i aïllades, serà d'eficàcia la propaganda que pels actes del Congrés portarem a terme. La nostra reunió anyal serà l'acte més convincent pera ls refractaris i els indiferents, i pera ls contraris si n'hi ha.

Hem de tenir concienca que es nostre l pes de la responsabilitat davant de tot el món esperantista; que nosaltres som la representació d'aquell moviment a la nostra terra. Per dignitat, per l'Esperanto, fem que aquell acte sigui gran, pera que pugui restar-ne inesborrable record.



## PRI LA VORTARO DE GROSJEAN MAUPIN

ŜAJNAS al ni, ke certiginte ke en nia lando estas neniŭ idisto, ke la reformemo estas tute nekonata de ni, kaj ke ni estas sinceraj, senpasiaj, konvinkitaj partianoj de la Fundamento kaj de la deklaro de Boulogne sur Mer, oni ne juĝos nin suspektaj se ni

aldonas ke la vortaro de Grosjean Maupin tute ne maltrankviligis nin, kaj ke ni *ne* estas pretaj subskribi ian ajn proteston kontraŭ ĝi.

Unu fojon por ĉiam ni akceptis la Fundamenton, kaj unu fojon por ĉiam ni akceptis la Oficialajn Instituciojn kun iliaj roloj en la evoluado de la Lingvo. Krii. protesti, barakti tial ke iu, en uzo de sia rajto proponas aŭ konstatis novajn radikvortojn, kiujn nur la praktikado valorigos kaj la Akademio oficialigos, tion ni ne faros, ĉar tia agado, krom tio, ke ĝi estus kontraŭa al la individua libereco, montrus mankon de fido al niaj Institucioj, kaj al nia natura forto, kaj katenus por ĉiam la lingvon.

Amaso da vortoj nefundamentaj troviĝas en la vortaro de Kabe, kaj en tiu de Boirac, amasego da ili troviĝas en la Enciklopedia vortareto de Verax, kaj neniuj protestoj montris sian bruon kapon super iliajn paĝojn nek super la kapon de tiuj eminentaj aŭtoroj. Ni ne scias ĉu estas en Esperantujo privilegioj, sed se ili ekzistas, oni ne devas kalkuli sur nin por ilin respektigi. Ni kritikos la radikvortojn, kaj ni uzos aŭ ne uzos ilin, laŭ nia plaĉo, sed en ĉiu okazo ni nur scios danki la aŭtorojn, kiuj donis al ni la okazon prilabori por la riĉigado kaj kontrolado de la Lingvo. Sed same por ĉiuj.

Oni murmuris ĉirkaŭ ni, ke tiu protesto estas incitita de Sro. Cart pro personaj kaŭzoj. Ni ne povas kredi tion.

La *Dictionnaire Français-Esperanto* (jen pli grava afero ol Vortaro Franca Esperanta!) eldonita de la Presa Esperantista Societo kun antaŭvorto de Sro. Cart, estas modelo de enkondukado de plej arbitraj vortoj en nian leksikonon. Ni ne rajtas eĉ supozi, ke Sro. Cart havas du malsamajn mezurilojn, unu por la vortaroj de la firmo, kiun li direktas, alian por la vortaroj de aliaj firmoj.

Ni preferas kredi tute simple, ke tiuj, kiuj protestas forgesis momente ke nur la Akademio havas la rajton oficialigi la vortojn uzitajn kaj necesajn, kaj ke la rolo de la Akademio estus nula se oni rajtus neniam uzi novajn vortojn, kaj sekve, ilin proponi, kaj sekve ilian valoron kontroli per la uzado.

LA REDAKCIO





U NU el la ĉefaj redaktoroj de la Kataluna ĵurnalo *El Poble Català* publikigis, antaŭ kelkaj tagoj, en la interesa fako *Eĥoj*:

«Sro. Pujulà i Vallès estas kiel la prezidanto de nia respubliko esperantista. Aŭ almenaŭ nia urbestro. Estas mirinda en li, arbitrulo kaj satirulo estinta, la fido kiun li havas en lingvo elirinta el la gramatikaj laborejoj. Ĉar Sro. Pujulà, kun sia tuta energio de entuziasmo kaj sia senvantea kulturo, bataladas por ke, iam, sur la kapoj de la homoj aperu la mirakla flamo de Sankta lingva Spirito kiu tra la tero dissemos la vortojn «interkompreniĝu unuj kun aliaj», imitante, tiel, la «amu unuj la aliajn» malnovajn.

— Ĉu Esperanto, amiko Pujulà, ne malantaŭeniras?

— Ne.

— Sed, ĝi kreskas do?

— Tre multe. Nur en Barcelono ni estas pli ol tri mil esperantistoj.

— Se via partio iom pli grandiĝas, vi povos baldaŭ gajni la balotojn. —

Pujulà, post ekrideto, diris:

— Kaj stranga afero. En fremdaj landoj, Esperanto estas apartenaĵo de la homoj poliglotaĵ, inteligentaj kaj eĉ revoluciemaj. La literaturistoj ankaŭ fervore ĝin utiligas; tamen ĉi tie, la esperantista plimulto estas precize formata de nekleraj laboristoj. Kun kia fido kaj entuziasmo ĉi tiuj lernadas! Mi vidas kiel belan kaj esperoplenan spektaklon la priokupon de masonisto aŭ metallaboristo, pri gramatikaj aferoj. Estas iuj sciantaj tiel bone la verbojn kaj adjektivojn kiel sian propran metion. —

Kun entuziasmo kreskanta parolas Pujulà. Lia parolo devigas nin forlasi ĉian ajn ironion kaj kredi, tute kredi, ke la tasko de tiuj homoj estas kultura kaj civitama. Lia evangelia libro estas gramatiko, kiel ĉe aliaj estas biblio aŭ programo.

Je la fino de nia interparolado, Sro. Pujulà donis al ni ĉi tiun eĥon:

— Post la dua Pasko, en tago ne ankoraŭ difinita, okazos en Tarragona la dua Kataluna nacia kongreso.»



## STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO

(Sékvo)<sup>1</sup>

SCENO kun la senco SCENEJO

Sab. — La sceno prezentas tre malriĉan loĝejon. (48)

— La sceno prezentas pentristlaborejon. (86)

— Sama sceno, kiel en la unua akto. (123)

SE kiel interjekcio aŭ helpavorto tradukaŭte la vorton katalunan *si*, kiu estas ofte uzata en tiu lingvo kun la senco «sed» «ja» aŭ iá alia vorto aŭ frazo, aŭ tute simple por plifortigi la frazon. Oni renkontas en «La Patrino» «se» kiel tradukon de kataluna *si*.

Sab. — Ne, se mi diras al vi tion, kaj malgraŭ tio mi ne plendas, (22)

Orig. — *No, si t dic això, i no s que m planyi.*

Rap. — Ne kiel plendon, mi diras tion al vi.

Sab. — Se mi ne faras tion nur por ci! (30)

Orig. — *Si no ho faig solament per tú!*

Rap. — Sed, ne nur por ci mi faras tion!

Sab. — Se ĉio estas studaĵoj, kaj nenio plu! (32)

Orig. — *Si tot son estudis i res més!*

Rap. — Sed ĉio estas nur etudoj! (au: sed ĉio estas etudoj kaj nenio alia!) (Rimarko pri «plu»):

Sab. — sed... se tio ne estas ebla! Se ne estas ebla! (68)

Orig. — *Però... si no pot ser! Si no es possible!*

Rap. — sed... tio ne estas ebla! Ne estas ebla!

Sab. — Se tio estas bono por ĉiuj! Se mi sentas ĉe, la tempioj ĝian bruladon! Se mi sentas min kvazaŭ senpeza! Same kvazaŭ mi levigus! Se mi estos feliĉa patrino!... Ĉu vi ne volas, ke ili venu? (36)

Orig. — *Però si serà un bê per a tots plegats! Si ja veig la claror de la*

1) Mallongigoj. — Sab: Teksto de Sro. A. Sabadell. — Orig: Teksto originala. — Rap. Ĝusta traduko laŭ opinio de la Raportinto. — La numeroj montras la paĝojn. (Vidu la numerojn 4<sup>a</sup>, 5<sup>a</sup>, 6<sup>a</sup>, 7<sup>a</sup>, 8<sup>a</sup>, 9<sup>a</sup> kaj 10<sup>a</sup>.)

*gloria! Si m sento la cremor als polsos! Si m sento com si no pesés! Com si m'alcés tot sol en laire! Si serem feliços mare!.. Que no voldria que vinguessin?*

Rap. — Sed ĝi ja estos bono por ĉiuj ni! Mi jam vidas la helon de l'gloro! Mi jam sentas ĝian brulon, (ardon) ĉe la tempioj! Mi sentas min kvazaŭ senpeza! Kvazaŭ mi tute sola leviĝus!.. Ni ja estos feliĉaj, patrino!.. Ĉu vi ne volas ke ili venu?

Sab. — sed, se mi diras al ci, ke mi ne... (87)

Orig. — *Però si t dic que no...*

Rap. — sed mi ja diras (al ci) ke ne...

Sab. — Ne se tute ne malutilas al mi, ke oni min elveku! (92)

Orig. — *No, si no m ja res que m despertin!*

Rap. — Nu, estas al mi egale, ke oni min veke!

Sab. — Sed vi forgesis diri al li, ke ne estus la pentrarto, kiu suferigadus lin, se nur tiuj, kiuj sin nomas bonfaruloj. (107)

Orig. — *Però s van descuidar de dir que no seria la pintura lo que l faria patir, sinó ls que s dinen benefactors.*

Rap. — Sed vi forgesis diri, ke ne estos la pentrarto kio suferigados lin, sed nur tiuj kiuj sin nomas bonfaruloj.

Sab. — Se ili sendos por ke ni revenu... (119)

Orig. — *Si ns enviarán a buscar...*

Rap. — Ili ja venigos nin. (aŭ: ili ja repetos nin veni.)

Sab. — ke se ci ne silentigos min! (120)

Orig. — *no, si a mi no m'aturarás!*

Rap. — Ho ne, min vi ne haltigos! (Silentigos?)

Sab. — Sed, se estas ŝi, mi ĵuras ke ŝi estas, kiu kuraĝigas min labori! (120)

Orig. — *Però si s ella: si t juro que s ella la que m dona dalit de treballar.*

Rap. — Sed estas ŝi, mi ĵuras ke estas ŝi, kiu donas al mi fortojn por la laboro!

Sab. — Kion mi diros al ci, se ci ne komprenos! (73)

Orig. — *Que t diré jo, si no u entendrtas!*

Rap. — Kion mi diros al ci! Ci ja ne komprenos!

Sab. — Do, mi nenion nutras, se nur tion kion mi povas nutri. (100)  
 Orig. — *Doncs jo no crio res que no pugui mantenir-ho.*

Rap. — Do, mi bredas nur tion, kion mi povas nutri (Laŭvorte: Do, mi bredas nenion, kion mi ne povas nutri.)

## SEKVI kun la senco IRI DE — AL

Sab. — Kiam mi vidis ekspozicion, mi mangis ĝin per la okuloj; mi sekvis ĉiun pentraĵon, unu post la alia, kvazaŭ ili estus floroj kaj mi abelo. (40)

Orig. — *Quan veia una exposició la devoraba amb els ulls: anava seguint tots els quadros d'un a un com si fossin flors i jo una abella.*

Rap. — Kiam mi vizitis ekspozicion, mi mangegis ĝin per la okuloj; mi iris de unu al alia pentraĵo (aŭ de pentraĵo al pentraĵo) kvazaŭ ili estus floroj kaj mi abelo.

## SEKVI

Sab. — Ci sekvu. (40)

Orig. — *Ves dient.*

Rap. — Diru ankoraŭ. (aŭ) Daŭrigu.

## SESHORA

Sab. — ... la seshora veturilo. (128)

Orig. — ... *el cotxe de les sis.*

Rap. — ... la veturilo de la sesa horo.

## SUNIGI

Sab. — ... tiun placon sunigitan. (77)

Orig. — ... *aquella plaça assoleiada.*

Rap. — ... tiun placon banitan de la suno (aŭ helan de suno).

## ŜANCO, kun la senco BONA ŜANCO

Sab. — Ĉar hodiaŭ mi atendas la ŝancon.

Orig. — *Es que avui espero la sort!*

Rap. — Ĉar hodiaŭ mi atendas (esperas) la bonan ŝancon!



## SATI VIDANTE

- Sab. — Mi pli ŝatas vidante bakajon el tiuj! ol... (9)  
 Orig. — *M'estimo més veure una fornada d'aquestes... que...*  
 Rap. — Mi pli preferas vidi (aŭ: pli ŝatas vidi) bakajon... ol...

## Trouzo de TIE en la traduko de kataluna HI (franca y)

- Sab. — Pro tio mi ilin iras serĉi. = sed!.. = Mi iras tien. (30)  
 Orig. — *Amb això, vaig a cercarlos. = Pero .. = Hi vaig.*  
 Rap. — Tial, mi iras serĉi (eble: renkonti) ilin = sed... = Mi iras.  
 Sab. — Kiel lipoj ĉirkaŭitaj de animo por tie kisi kaj preĝi. (63)  
 Orig. — *Com uns llavis voltats d'una ànima per a fer-hi petons i resar-hi.*  
 Rap. — (Mi sincere konfesas, ke mi tute ne komprenas, kion signifas «lipoj ĉirkaŭitaj de animo» nek kion oni kisas — ĉu la lipojn, ĉu la animon, — nek kian signifon havas la verbo preĝi en la frazo. La originalo estas kiel eble malbonstila. Eble en tiu ĉi okazo, la «tie» de la traduko bone konservas la konfuzon).

- Sab. — Nun... mankas nur unu afero... ke ci ĉeestu tie, Sed mi jam scias ke ci ne povas ĉeesti tie. = Sed mi estos tie! Tie mi estos... kiam... (79)  
 Orig. — *Ara no més hi fa falta una cosa... que tú hi fossis. Però jo ja sé que no pots ser-hi. = Però hi seré! Hi seré quan...*  
 Rap. — Nun... mankas nur unu afero... via ĉeesto. Sed mi bone scias, ke ci ne povas ĉeesti. = Sed mi ĉeestos! Mi ĉeestos... kiam...

(Daŭrigos.)

ENLANDA MOVADO

BARCELONO

*Paroladoj kaj kursoj.* — Nia amiko Sro. D. Dalmau malfermis kurson ĉe la «Museo Pedagógico Experimental» per parolado okazinta la 1<sup>ma</sup> de Januaro 1911<sup>a</sup> kaj estis tre aplaŭdata de la multenombra ĉeestantaro. Post la

parolado aliĝis al la kurso pli ol 20 lernantoj. Tiu kurso okazas ĉiu mardon kaj jaŭdon noktoe kaj estas klarigata laŭ la natura metodo.

En la grupo «Barcelona Stelo» estis malfermata kurso por tramveturilistoj klarigata de Sro. Grau Casas. Ĝi okazas lundojn kaj jaudojn de la 9<sup>a</sup> kaj 1/2 ĝis la 10<sup>a</sup> kaj 1/2 nokte.

En la loĝejo de la kvarteta societo «La Filantrópica» okazas ankaŭ kurso ĉiujn mardojn kaj jaŭdojn nokte de la 9<sup>a</sup> ĝis la 10<sup>a</sup>.

*Esperantistaj vendredoj.* — La vendredon 13<sup>an</sup> de Januaro okazis la unua kunveno ĉe la grupo «Semo» (Ateneu Enciclopèdic Popular).

La samideanoj kiuj kunvenis en la salonon de tiu grupo, agrable pasigis horon, aŭskultante la elokventan paroladon de la Prezidanto de la K. E. F., Dro. Bremón, kiu bedaŭris la mankon de aĉrobitaj profesoroj en Katalunujo.

La ĉeestantoj premiis la laboron de Dro. Bremón per longa aplaŭdado kiu varme aprobis la laborojn kiujn la Komitato de K. E. F. faras por la disdonado de «Atesto pri lernado kaj pri profesoreco».

*Festeno.* — Por solenigi la V<sup>an</sup> datrevenon de la fondiĝo de «Espero Kataluna» tiu Societo organizis festenon kiu okazis la 30<sup>an</sup> de Decembro en la societa sidejo. La partoprenintoj estis multenombraj kaj inter ili ni vidis multajn fraŭlinojn.

La Prezidanto Sro. Rosals malfermis la paroladojn kaj post li parolis Sroj. Cases, Bremón, Pellicer, Bartomeu, Astell, Fino, Saltiveri, Sroj. Morató, Dalmau kaj Urbez. Ĉiuj esprimis la deziron ke la vivado de la Societo estu longa kaj fruktodona, ricevinte ĉiujn bruegan aplaŭdadon. Oni sendis telegramojn, laŭ propono de Sro. Cases, al Dro. Zamenhof kaj Sroj. Sebert kaj Bourlet.

Finigis tiu bela festo en dancado, kiun la gejunuloj daŭrigis ĝis la unuaj matenaj horoj. La sidejo estis bele ornamita per esperantaj tolaĵoj.

*Teatra festo.* — Organizita de la grupo «Supren...!» okazis teatra festo la 31<sup>an</sup> de Decembro en la teatreto de la C. N. R. Fivaller.

La ganoj de tiu grupo ludis la komedion *Fianĉinigo de Sovaĝulineto* kiu estis ludata unuafoje, kaj la katalunan komedion *El mestre de minyons*.

La kataluna komedio plene sukcesis. Gratulojn al ĉiuj. La agemeco de la aktoraro estas vere laŭdinda.

*Esperantistaj vespermanĝoj.* — La 16<sup>an</sup> de Januaro okazis la unua esperantista vespermanĝo en la hotelo «La Terrasse». Inter la ĉeestantoj ni vidis Srojn. Pujulà, Bremón, Rosals, Codorniu, Torent, Balsells, Dalmau, Astell, González, Pellicer kaj aliajn kies nomojn bedaŭrinde ni ne memoras.

Dum la vespermanĝo la tempo rapide forflugis kaj ni estas certaj ke la venontaj dek sesaj atingos ankoraŭ pli da sukceso.

*Festo de la Epifanio.* — La 6<sup>an</sup> de Januaro okazis en la sidejo de «Espero Kataluna» tiu ĉi festo kiu bone sukcesis dank'al la spritaj leteroj kiujn la *Reĝoj* ricevis de la societanoj; inter la subskriboj ni memoras la nomojn de Finoj, Cases, Saltiveri, Angladà, Gibert, Cunill, k. a.

*Nova Komitato.* — La grupo «La Rondo» elektis la jenan novan komitaton : *Prezidanto*, Joan Campdelacreu; *Vicprezidanto*, Jaume Muria; *Sekretario*, J. Ferrer; *Vicsekretario*, J. Aran; *Kasisto*, P. Aguiló; *Kalkulisto*, J. Estrems; *Bibliotekisto*, J. Cervera; *Voĉdonantoj*, R. Just, J. Ferrando, N. Brias kaj Rozo Padreny.

*Esperanta Rubriko de «La Publicidad».* — Tiun rubrikon — kies redaktoro estas Sro. Delfi Dalmau — ĉiusemajne oni pli legas. Krom la barcelona movado ĝi enhavas gravajn artikolojn verkitajn de niaj pioniroj; ĝin, do, devas legi ĉiusemajne ĉiu esperantisto.

#### MANLLEU

Ĉiuj lernantoj de nia samideano B. Nogué, kreis «Esperantista Amik-eco» n. Ilia una decido estis aliĝi al «K. E. F.».

La 1<sup>an</sup> de Marto, la Kataluna societo «Rafel de Casanova» malfermos Esperantan kurson.

#### MAHO (Balearaj Insuloj)

«Mahona Grupo Esperantista», elektis la jenan Komitaton : *Honoraj Prezidantoj*, Dro. Zamenhof, Sro. J. Juaneda, Pastro., Sro. Prezidanto de Scienca Mahona Ateneo kaj Sro. Prezidanto de H. S. p. p. Esperanto; *Aktiva Prezidanto*, Sro. J. M.<sup>a</sup> Doménech Puigjaner; *Voĉdonantoj*, Sroj. A. Tuduri Ponseti, J. Sala Gomila, A. Fradera Carreté; *Kasisto*, E. Sintes Rotger; *Sekretario*, Sro. B. Pons Aragonés; *Arĥivisto*, Sro. P. Ripoll Busquets.

Ĝia adreso estas : Grupo Esperantista. — Ateneo.

#### LLEIDA

Niaj samideanoj de Lleida estas pretigante la fondon de grupo. La provizora komitato konsistas el : Sro. J. Martinez Vallespi, infanteria kapitano, *Prezidanto*; Sro. F. P. Morera, arĥitekturo, *Vicprezidanto*; Sro. F. Fauta, profesoro, *Sekretario*; Sroj. J. Solé, R. Sans, J. Morante, *Voĉdonantoj*.

Ni esperas ke per la fervoro kaj agemeco de tiuj samideanoj, Esperanto baldaŭ triumfos en tiu ĉi urbo. Antaŭen!

#### SABADELL

Sub la nomo «Komerco-Industri-Esperantista Oficistaro» nia grava societo «Centre de Dependents del Começ i de la Industria» fondis Esperantistan Sekcion, kies celo estas faciligi al siaj anoj la pligrandigadon de siaj konoj pri Komerco kaj Industrio, per Esperanto, kiun ĝi propagandos penante fari ĝian uzon ordinara, kiel eble plej baldaŭ, en internaciaj komercaj kaj industriaj aferoj. Sroj. R. Graupera Garrigó, *Prezidanto*; J. Bernaldo, *Vicprezidanto*; R. Bassols, *Kasisto*; J. Arús, *Bibliotekisto*, kaj P. Oriach Solá, *Sekretario*, partoformas ĝian estraron.

La ĉiutaga jurnalo *Diari de Sabadell* enpresigis pri-Esperantajn artikolojn subskribitajn de nia samurba federaciano J. B. M.



— «Esperanta Semo», okazigis propagandan feston en la granda salono de la grava laborista societo «Cercle Republicà Federal» (Respublikana Federala Klubo) kie la vorto Esperanto entuziasmigis la multajn ĉeestantojn,

En ĝi partoprenis Sro. Administranto de K. E. Joan Piferer, legante la verkon «Esperanto ĉe la laboristoj», de nia amiko Josep Altura.

Nia redaktoro Antoni Martí, prezidanto de Esperanta Semo priparolis pri la temo «Progresoj de Esperanto» kaj «Esperanto kaj la internacià paco».

Sro. Joan Camps, vicprezidanto de E. S. pritraktis la temon «Naciismo-Federalismo-Esperanto».

Sro. Joan Mora, Prezidanto de la Respublikana Federala Klubo, prezentis la partoprenintojn, kaj ĉe la fino, la prezidanto de E. S. dankis la aŭdantaron.

Ĉiuj estis tre aplaŭditaj.

#### VENDRELL

La ĉi tica grupo «Fratego» elektis la jenan komitaton: *Prezidanto*, Jacob Marcé; *Sekretario*, Joan Constanti; *Kasisto*, Magi Güell; *Voĉdonantoj*, Salvador Evertil kaj Ramon Corbella.

La 4<sup>ta</sup> de Marto la grupo inaŭguros ĝian verdan standardon.



## ALILANDA MOVADO

«La Sepo» resta profundamente reconeguda al gran nombre de revistas esperantistas que han cridat l'atenció de llurs llegidors sobre l Seté Congrès, i preferentment al *Holanda Pioniro*, *Paris-Esperanto* i *Universo*, els quals li han dedicat articles especials, i a *Germana Esperantisto*, que mensualment publica correspondencies sobre «La Sepo». També està molt agràida a la «Germana Esperantista Societo», que organitza conferencies, amb projeccions lluminoses, sobre l Congrès durant la VI assamblea d'esperantistes alemanys, que tindrà lloc a Lübeck els dies 4 i 5 de Juny.

— El secretari-caixer de «La Sepo» reb moltes cartes en les quals se li demanen tota classe d'informes. A fi de no compliear el gran treball que representa contestar a cada un dels demandants, desitja que s'atenguin a les noticies que tots els mesos publicarà la *Belga Esperantisto*. Una circular especial de «La Sepo» serà repartida durant el mes de Març.

— El president de «La Sepo» va parlar amb els gerents del Sindicat d'Hôtels i Restaurants d'Antwerpen. Aquests senyors prometeren fer tots els possibles pera facilitar l'estada dels esperantistes a dita ciutat, prometent que molt aviat podrien oferir notes de preus. Tots aquests informes seran publicats en circular, també especial, en el número de Març del *B. E.*

— El reverent senyor A. Van Griethuysen s'oferi a fer el sermó en esperanto durant la festa evangelista que tindrà lloc el 20 d'Agost, dia en que s'obrirà l Congrès.

— Referent als temes que seran tractats en el Concurs Literari, podem donar les següents noves :

El Comitè organitzador del Congrés ofereix 100 francs a la millor *Historia de l'Esperanto*. (20 pàgines com les de la B. E.)

La Redacció de B. E. ofereix 50 francs a la millor noveleta original. (12 pàgines format de B. E.)

El «Grupó Esperantista d'Antverpen» regala 50 francs a qui millor descapdelli i següent tema : *Sobre l'utilitat de l'Esperanto en el Comerç : manera d'introduir l'ús de la llengua internacional a les relacions comercials*.

— El Comitè, per medi d'una vibrant alocució dirigida a tots els esperantistes, desitja que aquests proposin més temes i ofereixin premis. Dirigir-se, per a més detalls, al secretari-caixer de «La Sepo».

— Hi ha creixent entusiasme per la representació de *Kaatje* durant el Congrés, essent moltíssims els exemplars ja venuts.

— El ministre belga d'Arts i Ciències ha posat ja a disposició del Comitè el gran Saló de festes i totes les dependències de l'«Ateneu Reial».

— «La Sepo» ha obert compte corrent en el «Banque de Reports».

— El nombre de congressistes adherits fins al 4 de Febrer es de 422.

(Extret de *Belga Esperantisto*.)



## OFICIALA PARTO

Reunit el Comitè Directiu de «K. E. F.» el dia 19 del corrent, després d'oberta la sessió pel president Sr. Dr. J. Bremón Masgrau, el Sr. Joan Piferer, administrador caixer, feu conèixer el moviment administratiu durant l'any 1910, l'estat de comptes del qual, després d'esser examinat, fou aprovat per presentar-lo als senyors socis de «K. E. F.»

Després de breu discussió referent a l'ordenació de cobrances per a 1911, s'acordà que s'enviessin a tots els delegats les *membrokartojn* de llur respectiva localitat, pera que 'ls senyors socis facin efectiva an el delegat corresponent la quota anyal; i que 'ls que no puguin fer-ho d'aqueixa manera enviïn directament l'import an aquesta Administració en segells de correu de 15 centims de pesseta.

Després se parlà del proper Congrés de «K. E. F.» a Tarragona, acordant el Comitè enviar les instruccions necessaries a la societat «Tarragono Esperanta» per a que, d'acord amb les principals entitats i autoritats de Tarragona, nomeni el Comitè local per a l'organització dels festeigs i demés actes que y tindran lloc, fixant pera llur celebració 'ls dies 24 i 25 de Juny.

Finalment, el Comitè acordà fer present a tots els federats que vulguin presentar algun tema a discussió que, d'acord amb l'article 7 del nostre reglament, tenen temps fins al 15 de Maig d'enviar-lo al lloc social, per a que se'n pugui així donar conèixement en el número de Juny.

Tots els temes auran de venir firmats per llurs autors, els quals auran de defensar-los davant del Congrés.

Solament podran prendre part a les tasques del Congrés els federats, per a lo qual serà necessari tenir ja la *membrokartojn* de 1911.

Mensualment el Comitè anirà donant els detalls necessaris per a que pugui

tot-om veure l'importancia que té'l nostre Congrés per a l'avenir de l'Esperanto a Catalunya.

Veus-aquí, ara, els comptes que presenta'l Comité Directiu :

## MOVIMENT DE CAIXA EN 1911

Poblacions	Socis inscrits	Quotes cobrades	Pessetes	Cts.
Sabadell . . . . .	42	40	120	
Ripollet . . . . .	1	1	3	
Reus . . . . .	12	12	31	50
Sant Llorenç Savall . . . . .	1	1	3	
Vilanova i Geltrú . . . . .	6	6	16	
Vic . . . . .	24	16	48	
Barbarà del Vallès . . . . .	3	3	9	
Balaguer . . . . .	2	2	6	
Cambrils . . . . .	2	2	6	
Olot . . . . .	27	27	81	
Terrassa . . . . .	53	50	150	
Aiguafreda . . . . .	1	0	0	
Manlleu . . . . .	9	9	27	
Barcelona . . . . .	87	80	240	
Tarragona . . . . .	8	8	24	
Premià de Mar . . . . .	1	1	3	
Castellar del Vallès . . . . .	2	1	3	
Tivissa . . . . .	1	1	3	
Moncada . . . . .	1	1	3	
Mataró . . . . .	1	1	3	
L'Escala . . . . .	1	1	3	
Berga . . . . .	1	1	3	
Sant Feliu de Codines . . . . .	1	1	3	
Arbós . . . . .	6	6	18	
Vendrell . . . . .	2	2	6	
Igualada . . . . .	6	4	12	
Girona . . . . .	7	7	21	
Vilafranca de Penadès . . . . .	2	2	6	
Caldes de Malavella . . . . .	1	0	0	
Borges Blanques . . . . .	1	1	3	
Total socis . . . . .	312	287		
Entrega de la societat «Esperanta Semo» a «K. E. F.», so- brant de la subvenció de l'Ajuntament de Sabadell a dita entitat . . . . .			175	
Exemplars de K. E. venuts <i>ponumere</i> . . . . .			6	40
Total entrats a caixa . . . . .			1,035	90



## DESPESES DE «K. E. F.» EN 1910

Mes	Dia	Conceptes	Ptes.	Cts.
Febrer	1	Factura Horta. . . . .	22	
»	6	3 fulls paper segellat. . . . .	7	
»	10	Viatge a Barcelona per a aprovació del Reglament.	2	
»	17	1,000 sobres i paper cartes. . . . .	12	
»	21	Factura Campmany . . . . .	11	50
»	22	» Giner. . . . .	32	
»	28	Despeses correspondència d'aquest mes. . . . .	9	35
Març	2	Viatge a Barcelona per a aprovació del Reglament.	2	
»	5	3 llibres ratllats per a secretaria . . . . .	2	25
»	17	Un velograf . . . . .	6	
»	31	Despeses correspondència d'aquest mes. . . . .	2	35
Abril	4	Factura «L'Avenç». . . . .	102	50
»	26	1 full de paper segellat . . . . .	2	
»	30	Despeses correspondència i enviar revista . . . . .	8	90
Maig	6	Factura «L'Avenç». . . . .	100	
»	12	» Ribera . . . . .	30	
»	16	Remesa telegrama a Varsovia. . . . .	9	65
»	31	Despeses correspondència i enviar revista . . . . .	8	30
Juny	18	Factura Zanni i C. <sup>a</sup> . . . . .	20	
»	20	» «L'Avenç». . . . .	205	
»	30	Despeses correspondència i revista . . . . .	6	90
Juliol	31	» » » . . . . .	7	50
Agost	30	» » » . . . . .	6	65
Setembre	22	Factura «L'Avenç». . . . .	158	75
Octubre	31	Despeses correspondència i revista . . . . .	9	40
Novembre	25	Factura «L'Avenç». . . . .	178	
»	30	Despeses correspondència i revista . . . . .	7	25
Desembre	10	Factura «L'Avenç». . . . .	25	
»	31	Despeses correspondència i revista . . . . .	6	15
Total. . .			1,040	40

## RESUMEN

Entrades . . . . .	1,035'90	Sortides . . . . .	1,040'40
Quotes 1910 per cobrar . . . . .	73'50	Factures per pagar. . . . .	125'00
Total, Ptes.	1,109'40	Total, Ptes.	1,165'40

## Diferencia

1,165'40

1,109'40

Total, Ptes. 56'00 de deficit

El president,  
DR. J. BREMON MASGRAU

El secretari,  
J. PUJOL MONFORT

L'administrador-caixer,  
J. PIFERRER RIFÀ

## BIBLIOGRAFIO

*Ni nur raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.*

*Amoro kaj Psiĥe*, de Lucius Apulejus. El la latina originalo tradukis Emilo Pfeffer. — Esperanta Biblioteko Internacia (Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin.) — Prezo : 0'20 sm.

*Esperantista Poŝkalendaro 1911*, redaktita de Prof. Drö. Siegfried Lederer. (Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin.) — Prezo : 1 m. (0'500 sm.)

*Dictionnaire Usuel Esperanto-Français*, de E. Grosjean-Maupin. — Kolekto de *La Revuo*. — Hachette kaj K<sup>o</sup>, Paris. — Prezo : 1 franko.

*Cours Méthodique d'Espéranto*. Corrigé des Thèmes, de Camille Aymonnier kaj E. Grosjean-Maupin. — Kolekto de *La Revuo*. — Hachette kaj K<sup>o</sup>, Paris. — Prezo : 1'20 franko.

*Mistera Krimo*. — Amuza unuakta komedieto, kiun aranĝis al Esperanto, Mikáelo Cases, Prezidanto de «Espero Kataluna» kaj Ĉefredaktoro de *Tutmonda Espero*. — Prezo : 40 spesdekoj (1 franko). Aĉetebla ĉe la aranĝinto, strato Salmerón, 229, 4.<sup>o</sup>, 2.<sup>a</sup>, Barcelona.

Estas bedaŭre! tamen ni rajtis esperi pli bonan laboron de nia amiko Cases. Ĝia tradukaĵo ne riĉigos la esperantan verkaron, sed male, ĉar ĝi ne estas konscia tradukaĵo. Mi tute bedaŭras esti devigata tion ĉi diri : ne ĉiam la veron oni ŝatas, kaj mia amiko eble ne pardonos al mi mian konfeson. Sed la vero estas devizo mia, kaj mi ne scias ĝin malkaŝi. Alie, mia opinio rilate al *Mistera Krimo* kiel esperantaĵo, ne estas deviga; oni povas kontroli ĉu mi diras aŭ ne diras la veron.

En nia bedaŭrinda, lando, kie oni aplaudas ĉion, kio koncernas al amikoj — tio estu aŭ ne estu aplaŭdinda aŭ laŭdinda — ne estos, eble tre favore akceptata mia recenzo.

Por ke oni ne juĝu mian opinion nesincera. nelojala, mi silentos pri ĉio, kio koncernas al la originalo. Ĉu indus la penon esperantigi tiun ĉi komedion? Ĉu ĝi atingas ĝian celon kiel komedio? Ĉu ĝi amuzos la legonton? Mi ne parolos pri tio, sed nur pri la laboro de traduko.

Kiel mi antaŭe diris mia fervora amiko ne sukcesis. En lia verko enŝovigis multaj nepardoneblaj al li eraroj, kiuj malbonigas lian laboron kaj faras lian esperantigitan komedion ne rekomendindan.

Plej gravaj eraroj : Pri *iĝ* : paĝo. 6<sup>a</sup> : Ne halt*iĝu* (*haltu*) plu; p. 20<sup>a</sup> : Vi elport*iĝas* (*elportas*) la vinon?; p. 24<sup>a</sup> : Silent*iĝu*. kaj en la sama paĝo oni trovas (*Silentu*); p. 28<sup>a</sup> : alproksim*iĝu* tiun seĝon (ĉu okaze *alproksimigu*); p. 29<sup>a</sup> : mi kontraŭvizi*iĝis* (ĉu okaze *kontraŭviziĝigos*); p. 31<sup>a</sup> : li subite halt*iĝas* (*haltas*).

Pri akuzativo : p. 3<sup>a</sup> : Tri pordojn dekstre al aktoro ; p. 10<sup>a</sup> : ... sen timon ian, mi reposedos mian veran personecon... ; p. 18<sup>a</sup> : Elegante vestita sen palton, ĉapon, barbon nek okulvitrojn ; p. 24<sup>a</sup> : Kian tromalsaĝajon !

Aliaj eraroj : p. 3<sup>a</sup> : Sur ĝi, lampo *ekbruligita* (*ekbrulinta*) ; p. 6<sup>a</sup> : ... regali a klientoj (la klientojn) ; la fiŝojn kiuj *sufidegas* ĉe la rivero (*abundas en*) ; *ĝis poste* (*ĝis baldaŭ*) ; p. 7<sup>a</sup> : *Interne* Sinjoroj ! (*eniru...*) ; p. 11<sup>a</sup> : *Ĝustatempa!* (katalune : «aproposit!») ĝi estas uzata kiel interjekcio ; p. 13<sup>a</sup> metante kreton *en* (*sur*) la bilarbastono ; p. 14<sup>a</sup> : samtempe *ke* (kial uzi *ke*?) metante kreton *en* (*sur*) la bilarbastono ; p. 18<sup>a</sup> *eksamoro* mia (*eksamo*) ; mi alvenas, mi alvenas ! (katalune : «ja vinc, ja vinc!») ; p. 21<sup>a</sup> : ... mi *neniam* vidis *nenie* ; p. 25<sup>a</sup> : silentiĝu ambaŭe (*ambaŭ*) ; p. 32<sup>a</sup>, 33<sup>a</sup> kaj 34<sup>a</sup> : skribado (*skribmaniero*).

Aliflanke ĉe la fino de la libro estas «Eraroj» (Preseraroj), kiu vere donas aspekton de libro bone korektita. Sed oni forgesis erarojn sur la paĝoj 3<sup>a</sup> (*montrobalo*, anstataŭ *montrotablo*) 12<sup>a</sup>, 18<sup>a</sup>, 22<sup>a</sup>, 23<sup>a</sup>, 25<sup>a</sup>, 28<sup>a</sup> k. t. p., k. t. p.

Mi ne konas nek havas la originalon (ĉu ĝi estas kataluna?) ; sekve mi ne povis kompari la laboron faritan de Sro. Cases, por min konvinkigi pri la valoro de la traduko.

Tamen mi ne komprenas, kial la tradukinto forgesis la nomon de la aŭtoro, kaj kial li *aranĝis* anstataŭ *traduki*.

Amiko, kara amiko : se la pioniroj tiel agas, kion ni povos postuli aŭ esperi de la simplaj esperantistoj? Ni estas devigataj pro nia rolo en la Kataluna kampo, per nia kulturo, per nia klereco, per nia bona agado, per nia serioza agado, per nia agmaniero, per ĉio kio estas en ni, influi sur la ceteraj esperantistoj por atingi konscian, seriozan memvaloran movadon. Ni fine montru ke nia kataluna movado estas en plena aĝo : ĉi tion postulas de ni nia idealo. Sed ne ĉiuj ankoraŭ perfekte ĝin komprenis, bedaŭrinde!

Mi plej fide esperas, ke en nova verko nia fervora batalanto plej bone sukcesos per sia talento. — D. SERDÁ.



## KORESPONDADO

Sroj. J. Más. Ĝi ne taŭgas por nia gazeto. Cetero ĝi estas tro longa. Ĝi taŭgos kiel propaganda artikolo ĉe ĉiutaga gazeto. — J. V. Vian verkon ni publikigos en proksima numero. — J. Amadés. Ni ne havas sufiĉan lokon por enpresigi vian ŝatindan roporton. Plie, ĝi estos ne legebla de la kompostistoj. Ni ĝustatempe ricevis viajn ekzemplerojn de *Espero de Katalunjo*; ni bezonas la unuan aperintan numeron; ĉu vi ĝin havas? — P. Alsina. Ricevitaj viaj leteroj. La versaĵo ne taŭgas.